



Novjorka Prismo

Numero 113

Aprilo 2002

*La Esperanto-Societo de Novjorko
kore invitas vin al sia aprila kunveno.*

DATO: Vendredon, la 19-an de aprilo 2002, 6:30-9:00 pm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South
(20th/21st Streets), NYC; 2nd floor
(check schedule in lobby for room
number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.
7:00 – Sofiya Soskina prelegos pri
*La Vivo kaj Verkoj
de Aleksandro Puŝkin.* ★



Portreto de A. Puŝkin de Orest Kiprensky

Protokolo de la kunveno de la 15-a de marto 2002

Je la sepa horo posttagmeze, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon. Ne estis gastoj. Ĉeestis 12 personoj. La korektaĵoj de la februara *Novjorka Prismo* estis pri malĝusta datreveno (estas ĝuste 110-jara anstataŭ 100-jara) kaj literumado de nomo (estas ĝuste SORENSEN anstataŭ SORENSON). La protokolo estis akceptata.

Nijl BLONSTEIN anoncis, ke Pam LIEBER donis kvin-minutan aktoradon en enscenigo de la teatraĵo "La Vaginaj Monologoj".

La marta prelego temis pri proverboj. Rochelle F. GROSSMAN legis el libreto verkita de Mary PULLEY pri proverboj. Rochelle ankaŭ legis el libro de la patro de ZAMENHOF. Ŝi menciis, ke ofte la tradukoj rimas, kiel "Kiam la kato promenas, la musoj festenas."

La ĉeestantoj donis ekzemplojn de proverboj el Esperanto, el la angla, kaj el aliaj lingvoj, kaj sugestis samsignifajn proverbojn en la angla kaj en Esperanto.

Tomaso ECCARDT legis el libro de poemoj en la sicilia lingvo de la titolo "La Damnita Lingvo" de Vincenzo ANCONA.

Je 8:47 pm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Tuj poste, kelkaj ĉeestantoj iris al la restoracio "My Cousin Vinny" por manĝi kaj trinki. ★

Protokolis: Stuart GREEN

IBM Plaza

La neformala kunveno de ESNY okazis pasintfoje en IBM Plaza. Proksimume sep homoj kunvenis je la 7-a de aprilo, kaj preparolis interesajn temojn kiel la karmemoran patriron (Elizabeto) de la brita reĝino, Honkongon, kaj la Interreton. Ni elektis ŝanĝi la kunvenejo al tiu konstruaĵo ĉar ĝi estas malpli brua ol Sony Plaza. Finfine ni bone aŭdis unu la alian! ★

– Thomas ECCARDT

Nova klaso de Esperanto komenciĝos en majo

Du homoj kontaktis min pere de la Interreto, kaj demandis pri la kurso, do mi kaj ili decidis komenci kurson en majo. Ĝi okazos verŝajne en K-marto (9-a strato) kaj daŭros almenaŭ sep semajnojn. Ambaŭ homoj invitis unu amikon, do kalkuliĝas 4 homoj en la klaso ĝis nun. Ĉu vi konas iun, kiu ankaŭ volas komenci lerni Esperanton? Se jes, bonvolu kontakti min ĉe 212-477-6516. ★

– Thomas ECCARDT



Pulmerkato

Ĉu vi deziras aĉeti pulon? Do, ne iru al la Stuyvesant Town Flea Market, ĉar la reguloj klare deklaras, ke oni ne rajtas vendi bestojn. Sed se vi deziras aĉeti uzitajn aferojn, aŭ volas helpi nin varbi Esperanton, bonvolu veni je la 18-a kaj/aŭ la 19-a de majo, kie ni starigos tablon. Tiu semajnfino okazos ĵus post la klub-kunveno de la venonta monato. ★



– Thomas ECCARDT

Volas korespondi

Karaj: Mi estas François HOUNSOUNOU, helplernanto en privata lernejo, kaj ĝenerala sekretario de Benina Landa Asocio. Mi enkondukis kaj instruas Esperanton al la bazlernantoj en publika bazlernejo nome Aguidahoué, pri kiu la hejmapago (pasvorto: Benin) estas:

www.iespana.es/Espana_es/marcel/

Mi dezirus korespondi kun vi; bonvolu akcepti mian korespondpeton. Mi dezirus al ni bonan kaj longan amikecon.

Kore kaj amike salutas vin,

François HOUNSOUNOU

<eobazlernejo-instruado@caramail.com>

BP 226 Lokassa-Mono;

BENIN; West Afrika.

★

Dues are due for 2002!
Ĉu vi jam pagis vian kotizon?



Du [kronikaj?] malsanoj en Esperanto

En la angla, oni diras *like me* (kiel mi) kaj ne *what kind me* (kia mi); oni diras *so good* (tiel bona) kaj ne *so much good* (tiom bona); en la franca, oni diras *comme moi* kaj ne *quel moi*; *si bon* kaj ne *si beaucoup bon*; en la germana oni diras *wie ich* kaj ne *was für eine Art ich*; *so gut*, kaj ne *so viel gut*. Tamen, en Esperanto oni povas trovi *pantalono kia la mia* (pants what kind mine) kaj *ili ne estas tiom malbonaj kiom la homoj* (They are not so much bad how much people). Kiel tio okazis?

En 1954, nederlandano H.A. de Hoog publikigis libron titolitan *Du Malsanoj en Esperanto Kia-ismo Tiom-Kiom-ismo*. La aŭtoro malaprobis la uzadon de *kia* en komparoj kaj identigoj, kaj de *kiom* en grad-esprimoj, kie la pli simpla *kiel* tute sufiĉas kaj eĉ estus pli ĝusta. Tiuj uzadoj, kiujn li nomas "malsanoj", ŝajne estiĝis en Nederlando dum la 1930aj jaroj, kaj li volas demonstri al siaj samlandanoj, ke ili eraras. Lia baza tezo estas, ke *kiel* estas liganta vorto, kiun oni tute prave uzas en komparoj, identigoj, kaj grad-esprimoj. Li montras, ke *kiel*, kies baza senco estas maniero, povas esti uzata ankaŭ por komparoj kaj esprimoj de grado, ĉar ĝia senco ampleksas tiujn lastajn. Li ankaŭ montras, ke Zamenhof mem uzas *kiel*, kie la *kia*-istoj kaj *tiom-kiom-istoj* uzus *kia* kaj *kiom*. La *kia*-istoj apelacias al "la logiko" kaj pravigas sian uzon de *kia* per "kompletigoj" kun "estas", sed de Hoog montras, ke tiaj kompletigoj estas nebezonaĵoj aŭ eĉ tute eraraj. La *tiom-kiom-istoj* opinias la uzadon de *tiom* kaj *kiom* en esprimoj de grado pli logika ol tiu de *tiel* kaj *kiel*, ĉar la *tiom*-vortoj esprimas kvanton kaj ne manieron, sed de Hoog montras, ke *tiom* kaj *kiom* ĝenerale ne taŭgas por tiu celo, ĉar ili estas nur kvanto-vortoj, kiel *multe*, kaj ne bone esprimas gradon. Foje, tamen, *tiom/kiom* estas taŭgaj por speciala enfazo aŭ nuanco.

La aŭtoro citas rakonton de Teo Jung, por montri la taŭgecon kaj oportunecon de la vorto *kiel*: "Petro estas alta *kiel* giganto, li estas filo de la sama popolo *kiel* mi, kaj loĝas en la sama urbo *kiel* mi, kie li vizitis la saman lernejon *kiel* mi. Dum la pasinta somero li intencis vojaĝi en la saman regionon *kiel* mi, eĉ je la sama tempo *kiel* mi, sed li devis rezigni tiun intencon pro la sama kaŭzo *kiel* mi. Tial ni nun kune iros al la Universala Kongreso, kiu

ĉi jare estos en la sama lando kaj je la sama dato *kiel* la Olimpaj Ludoj." De Hoog tiam donas la "pli logikan" formon: "Petro estas alta *kia* giganto, li estas filo de la sama popolo *kies* mi, kaj loĝas en la sama urbo *kie* mi, kie li vizitis la saman lernejon *kiun* mi. Dum la pasinta somero li intencis vojaĝi en la saman regionon *kien* mi, eĉ je la sama tempo *kiam* mi, sed li devis rezigni tiun intencon pro la sama kaŭzo *kial* me. Tial ni nun kune iros al la Universala Kongreso, kiu ĉi jare estos en la sama lando kaj je la sama dato *kiem* [*kia* plus *kiam*] la Olimpaj Ludoj." Kio estas gajnita per tiaj ridindaj komplikaĵoj?

Legante la libron de de Hoog, mi tute konvinkiĝis, ke li pravas. Fakte, la grandaj Kalocsay kaj Waringhien ankaŭ konvinkiĝis pri tio, kaj agnoskas siajn antaŭajn erarojn tiurilate kaj la pravecon de de Hoog (vidu Plenan Analizan Gramatikon, kvina korektita eldono §262.3 kaj §88.5 Rim VII). Mi citu rilatajn porciojn: "... oni tute ne bezonas kompletigi la frazelementoj je plena propozicio, kaj por tio anstataŭigi *kiel* per *kia* estas. Tiu kompletiga teorio kondukis al la ne-zamenhofa lingvuzo, kiun ankaŭ ni mem rekomendis en la dua eldono, ke en tiaj okazoj oni uzu *kia* anstataŭ *kiel*, ĉar tio estas 'pli gramatika'... La uzo de *tiom* por esprimi gradon, nomata de de Hoog '*kiom malsano*', estas tute ne-zamenhofa..." Tamen, la malsanoj ankoraŭ ekzistas! En mia malmulta legado, nur dum la pasinta duonjaro, mi trovis la sekvantajn:

- ... pro kio, ke la verko memestas *tiom* grandega, ke ĝi havas libroforme 81 volumojn, ...
- Ĉu vivtenado esta afero *tiom* malfacila?
- La homoj estas movataj pli multe per

Krucvortenigmo

de Lillian RACHELE

1	2				3	4
5					6	
7			8	9		
10				11		
12			13			
14					15	
16						

HORIZONTALA

1. Pereo de multaj homoj
5. En ian direkton
6. Komenci (r)
7. Dua noto de la muzika gamo
8. Direktu ŝipon kontraŭ la vento
10. Demonstrativa korelativo (r)
11. Irigi antaŭ si (r)
12. Interne
13. Dek dekoj
14. Telefona saluto

(r) = radiko

15. Glaso _ akvo
 16. Vidataj je la marbordo dum uragano
- VERTIKALE
1. Batilo por enigi najlojn
 2. Ingredienton de graso
 3. Protekto
 4. Rilataj al misteraj fenomenoj
 9. Kolektive ★

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Aprilo

19

ESNY KUNVENO

Sofiya Soskina prelegos pri la Vivo
kaj Verkoj de Aleksandro Puŝkin
Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

Majo

Tagmanĝo

5

Dimanĉon, 1:00 pm ĉe IBM
(Limdato por kontribuadoj por Prismo 114)

ESNY KUNVENO

17

Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

eksteraĵoj *kiaj* sociala fono, klaso aŭ rilato profita, ol per la interna kompreno reciproka.

- "Dio mia, jam *tiom* malfrue?"
- ... *kiam* ŝi memoris tion kio estas *tiom* longa kiel mil Kristnaskaj tagoj, ...
- Ili jam diris tion *tiom* longe, ke ĝi nun estis parto de la enscenigo.
- Eĉ la marikoj – *tiom* longaj ke ili falis ĝis la genuoj *kiam* la brakoj estis rektaj, ...
- Ĉu mirinda lerta poeto, *kia* vi?

La lasta estas de iom diketa Skoto, multe respektata en Esperantujo. Kiel ni diras angle, kompatinda de Hoog "devas esti turniganta en sia tombo"! ★

– Maurice J. WITTENBERG

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Stuart Green
(631) 751-5683

Vicprezidanto
Thomas Leong
(718) 981-4252

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 738-6084

Program-Direktoro
Arruro Bonetti
(718) 257-6091

Novjorka Prismo

Numero 113 – Aprilo 2002
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuadojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com

© 2002 Esperanto Society of New York